FN PER ANC 47

N°242 JULIO 2010

# NORMANDA ESPERANTO BULTENO

## ESPERANTO - NORMANDIE

Redaktas : Pierre Lemarchand, 2 les Terres Quemines 76113 Hautot sur Seine. Tel. 02 35 34 28 78
LEMARCHANDPI@wanadoo.fr

Abon-kotizoj : 8 Eŭroj . Esperanto - Normandie. C.C.P. 283.40.H Rouen.

## Les deux bouts de la langue,
### par Michel Onfray

Au commencement était Babel, chacun connaît l'histoire : les hommes parlent une seule et même langue, dite "adamique", celle du premier d'entre eux. Puis ils se proposent de construire une immense tour destinée à pénétrer les cieux. Pareille architecture suppose que les hommes habitant le même élément que Dieu en deviendraient de facto les égaux. Cette volonté prométhéenne agit comme une autre formule du péché originel car, goûter du fruit de l'arbre de la connaissance, c'est savoir tout sur chaque chose, autrement dit, une fois encore, égaler Dieu. Il y eut une sanction pour le geste d'Eve, personne n'a oublié... De même pour celui des constructeurs de Babel : la confusion des langues.

Dieu qui est amour, rappelons-le pour qui aurait la fâcheuse tendance à l'oublier, descend sur Terre pour constater de visu l'arrogance de ces hommes. "Il dit : "Voilà qu'à eux tous ils sont un seul peuple et ont un seul langage ; s'ils ont fait cela pour leur début, rien désormais pour eux ne sera irréalisable de tout ce qu'ils décideront de faire. Allons ! Descendons et là, brouillons leur langage, de sorte qu'ils n'entendent plus le langage les uns des autres." Et Yahvé les dispersa, de là, à la surface de toute la Terre, et ils cessèrent de bâtir la ville" (Gen. 11, 6-7) - où comment semer la discorde...

Dès lors, il y eut des langues, certes, mais surtout l'incompréhension parmi les hommes. De sorte que la multiplicité des idiomes constitue moins une richesse qu'une pauvreté ontologique et politique. On se mit alors à parler local, ce que d'aucuns célèbrent aujourd'hui comme le fin du fin. Je songe aux "nationalistes", plus justement nommés "indépendantistes régionaux", qui font de la langue un instrument identitaire, un outil de fermeture sur soi, une machine de guerre anti-universelle, autrement dit un dispositif tribal.

Précisons que le politiquement correct passe souvent sous silence cette information qu'il n'existe pas une langue corse, une langue bretonne, mais des dialectes corses ou bretons, chacun correspondant à une étroite zone géographique déterminée par le pas d'un homme avant l'invention du moteur. Le mythe d'une langue corse ou d'un unique parler breton singe paradoxalement le jacobinisme honni, car lesdites langues régionales sont compartimentées en groupe de dialectes - j'eus des amis corses qui, le vin aidant, oubliaient un instant leur religion et leur catéchisme nationaliste pour avouer qu'un berger du cap corse ne parlait pas la même langue que son compagnon du cap Pertusato ! Babel, Babel...

La langue régionale exclut l'étranger, qui est pourtant sa parentèle républicaine. Elle fonctionne en cheval de Troie de la xénophobie, autrement dit, puisqu'il faut préciser les choses, de la haine de l'étranger, de celui qui n'est pas "né natif" comme on dit. Or, comme une espèce animale, une langue obéit à des besoins relatifs à une configuration temporelle et géographique ; quand ces besoins disparaissent, la langue meurt. Vouloir faire vivre une langue morte sans le biotope linguistique qui la justifie est une entreprise thanatophilique. Son équivalent en zoologie consisterait à vouloir réintroduire le dinosaure dans le quartier de la Défense et le ptérodactyle à Saint-Germain-des-Prés...

*Sekvo paĝo 6a*

Les points de vue exprimés n'engagent que leurs auteurs et ne reflètent pas nécessairement l'opinion de la rédaction.

**En tiu numero :**


| | |
|---|---|
| Les deux bouts de la langue. Michel Onfray | 1<br>6 |
| Artikola propono .... | 2 |
| Kaiserslautern en Palatinato. | 3<br>4 |
| Mesaĝo de Aborigeno. | 4 |
| Festo en Toulouse | 4 |
| Nia Bulteno tra jaroj. 5. | 5 |

## Artilola propono por nia bulteno ...

La bulteno devus esti redaktita de la legantoj, sed pri kio skribi ?

Mia ideo estas proponi temojn polemikajn, kiuj devus interesi ĉiujn pensantajn homojn. Ekzemple pri nia sinteno kiu influas la estontecon de niaj posteuloj, pri nia respondeco pri la estonto. Certe multaj ne samopinios kiel mi, sed el la diskuto ekŝprucas la lumo. Eble vi opinias, ke vi ne estas sufiĉe lingve lerta. Ne gravas, mi estas certa ke la redaktantoj, kun plezuro, plibonigos vian laboron. Do kritiku miajn skribaĵojn, laŭ via propra opinio.

Mi aŭdis ĉe la radio, ke oni multe pripensas kiel regi la nutradon de la monda popolo. Kiel regi la rubaĵojn, kaj tiel plu, ĉirkaŭ la 2050aj jaroj. Tiam la nombro atingos 9 miliardojn da homoj. Sed ŝajnas ke la mondo estos fiksita je tiu jaro, kaj poste ne plue interesiĝas. Nun ni estas 6 miliardoj, do 3 miliardoj pliaj en 40 jaroj. Se oni rigardas la mezan nombron en la pasinteco, oni facile komprenas ke la nombro pli kaj pli rapide kreskas, kiam forfluas la tempo !

Do la plej grava afero ne estas kiel nutri la homojn, sed kiel limigi la kreskadon !

Kelkaj Islamaj religiuloj diras al la fideluloj : « Havu multe da infanoj, ĉar estas la rimedo por disvatigi en la mondon, kaj devigi ĝin honori Alahon. »

Aliaj Judoj pensas ke : « Ni estas elektitaj de Jahovo, kaj ni devas havi multajn infanojn por regi inter la popoloj de la mondo. »

Diskutante kun amiko, li diris al mi : «La aliaj devas bremsi la produktadon de infanoj. Sed tio ne valoras por la okcidentanoj, ĉar estas ili kiuj havas la kvalitojn por progresigi la sciencon. Se oni dezirus plibonigon de la mondo, oni devus havi infanojn por produkti grandvalorajn scientistojn... ».

Estas vere ke ni, okcidentanoj, estas la solaj kiuj laŭ la nombro malkreskas !

Ĉiuj opinias ke ili tute pravas, kaj ke la aliaj estas kulpaj...

Kaj koncerne Afriko la problemo estas iom alia :

Antaŭ la alveno de la okcidentanoj, la afrikaj virinoj havis multe da infanoj; sed pro la sanecaj kondiĉoj, multe mortis. La kutimaj interbribaj konfliktoj poste reguligis la popolkvanton kaj la kreskado estis praktike nula.

La okcidentanoj kunportis iom da sanigaj rimedoj, kaj ili preskaŭ malebligis la intertribajn batalojn. Tio malpermesis tiel grandaj pereoj kiel antaŭe. Sed la virinoj ĉiam faras grandan nombron da infanoj. Do nun, la popolkvanto kreskas.

Jen grandskale skizita la situacio ! Kion vi opinias pri tio ?

Mia opinio estas, ke oni urĝe devas malkreskigi la naskiĝokvanton !

Valora rimedo estas sufiĉe altigi la vivnivelon. Sed ĝeneraligo de la vivnivelo postulos multe pli da tempo, ol la pligrandigo de la homkvanto. La demando pri energio, kaj la pligrandigo de la rubaĵoj estos aliaj nesolvitaj problemoj.

Kompreneble malpliigo de la homnombro alvenigas al maljuniĝo de la popoloj. Ekzemple estas grava problemo por la Ĉinoj, kiuj draste kaj devige limigis la naskiĝojn.

Oni ne devas forgesi ke ĉiu naskito estos konsumanto de nutraĵoj kaj poluanto.

Tio kaŭzas problemon. Ĉar, kiam oni vivas pli longe, oni devas labori dum pliaj jaroj por pagi la emeritiĝon. Ni pripensu ke estas malpli da junuloj ! Sed pli longe labori, ne permesas liberi postenojn por la junuloj. Transloki multe da laboro en lokojn, kie la laborprezo estas malpli multekosta, tio pligravigas la senlaborecon.

Sed ŝajnas ke oni forgesas, ke kiam oni estigas senlaboriston, oni perdas aĉetanton ! Do, kiam tro multe da personoj estos sen laboro, kiuj aĉetos la malmultekostajn aĵojn produktitaj alie ?

Pri la klimata varmigo, mi ne estas certa ke la ĉefa kaŭzo estas la homagado. Certe ĝi havas influon, sed jam en praaj tempoj okazis varmigo de la klimato. Ekzemple, je la fino de la roma imperio, dum 200 jaroj, la vetero varmiĝis, kaj tute ne estis kaŭzita de la homaj agadoj. Povas esti la suno, kiu plivarmigas, aŭ la internaĵo de la tero, aŭ kombino de pluraj kaŭzoj.

Skribu al la bulteno por alporti viajn opiniojn. Tiel, ni povos havi viglajn kaj interesajn diskutojn. Vi ankaŭ povas proponi aliajn temojn. Kompreneble, tiamaniere vi plibonigos vian esperantan nivelon kaj konscios pri tiuj problemoj.

Je viaj klavaroj por aldoni viajn vidpunktojn pri tiuj tiel gravaj problemoj.

**Alain Chalm.**

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj.*

# Kaiserslautern en Palatinato

Francan-Germanan Esperanto-Kongreson parto prenis mi de la 21a ĝis la 25a de Majo .

Unuafoje, mi ĉeestis kongreson de franca asocio eksterlande, ignorante la landlimojn ! Kvankam kongresurbo estis en Germanio, la distanco ne estis granda : nur 2 horoj kaj duono inter Paris-Est kaj Kaiserslautern per germana TGV.

Inter 250 kaj 300 homoj ĉeestis la kongreson ; estis preskaŭ tiom da Francoj kiom da Germanoj. Ankaŭ venis kelkaj aliaj eksterlandanoj ; Do, la etoso estis vere internacia.

Bone organizitaj estis la aranĝoj. Komunaj manĝoj, vizitoj, ekskursoj ebligis kontaktojn kaj konversaciojn inter diverslingvanoj.

Mi ne ĉeestis ĉiujn kunvenojn kaj prelegojn sed okazis :

**Prezento de nigra-blanka filmo « Inkubo »** kiu estis farita en Esperanto en la jaro 1965 Post detruiĝo de la originala bendo, estis retrovita unu kopio; usona firmo financis la restaŭradon kaj eldonis la filmon en la jaro 2001 kun anglaj kaj francaj subtitoloj

**Prelego : Palatinato : Ponto inter Germanujo kaj Francujo.** La prelegisto klarigis ke tiu regiono havis, dum jarcentoj , intensajn rilatojn kun la najbara franca regno

**Forumo pri Afriko** : La geedza paro Derks flugis en 2009 al Burundo. Ili ege miris pri la entuziasmo kiun vekis la lingvo en la urbeto Rumonge ĉe lago Tanganjiko : tiun entuziasmon estas ŝuldata inter aliaj al la fakto ke Esperanto estas eŭropa ne-kolonia lingvo

**Konferenco de Eŭropa Esperanto Unio**

**Prelegoj de Eŭropo Demokratio Esperanto** : « Esperantista politika Konscio » kaj « EDE kia perspektivo ? »

**Asocio de Verdulaj Esperantistoj** : Eŭropa Parlamento, aliaj verdaj temoj (energio, klimato, nutraĵo, homaj kaj bestaj rajtoj)

Kompreneble la du ĉefaj asocioj :**Germana Esperanto Asocio kaj Unuiĝo Franca por Esperanto** organizis aparte siajn kongresojn ĉar membroj de ambaŭ asocioj devis pridiskuti siajn proprajn problemojn, voĉdoni diversajn statutajn raportojn, renovigi estraron, altigi aŭ ne la kotizojn ktp...Dum la kunveno de Esperanto-France, la raportoj estis aprobitaj. La diversaj regionaj federacioj kiuj subskribis kontrakton kun UFE raportis pri estintaj agadoj kaj pri estontaj projektoj Mi mem ne intervenis ĉar Esperanto-Normandie ne estas per kontrakto ligata al UFE ; tamen mi konstatis ke nur 25 Normandoj aliĝis la nacian asocion kiu agadas por ke politikestroj konsideru Esperanton kiel serioza afero !

**La vesperaj programoj** estis tre distraj. La muzikgrupo « Kapriol' » prezentis dancmelodiojn kaj kantojn kiuj fontas el tradiciaj repertuaroj nederlandaj ; kelkaj ludis dum longaj jaroj en la Esperanto-grupo « Kajto »

Mi retrovis kaj reaŭdis la korusan « Interkant' »kiu kunigas plurajn kantgrupojn el diversaj francaj regionoj. 63 gekantemuloj, muzikistoj ĉarmis niajn orelojn sub gvidado de Franjo.

Ankaŭ, jam aŭdita en Hillion dum Pasko, Gijom Armide faris koncerton kiu entuziasmigis

la internacian publikon

**Kaiserslautern** estas agrabla urbo kun multaj vidindaĵoj : la Japana ĝardeno, la ĝardena ekspozicio kun saŭroparko, la plej granda en Eŭropo, multaj monumentoj. Ĝi estis tre detruita dum la milito.

**Ekskursoj** estis proponitaj . Ni tiel povis viziti la burgon Lichtenberg kun muzeo de la Muzikistolando kaj muzeo de la pra-mondo kiu kondukis nin 290 milionojn da jaroj reen

Kiam ,tiutempe, Rejnlando-Palatinato estis la fundo de giganta lago, en kiu vivis dolĉ-akvaj ŝarkoj .

La marda ekskurso kondukis nin al Idar-Oberstein, urbo konata por siaj tajlejoj kaj muzeoj de valorŝtonoj kaj gemoj

**Resume**, la kongreso estis tre interesa. Bona estis la ideo kongresigi du naciajn asociojn en la sama urbo. Tio estis por mi kaj por mia edzino bona okazo retrovi germanajn amikojn kiujn ni jam konis . Venontjare dum Pentekosto, Germanoj kongresos kun Nederlandanoj en la germana urbo Münster

Mi memorigas al vi ke en 2011 dum Pasko ĉiuj francaj esperantistoj de diversaj asocioj retroviĝos en Sète

Por bone memori la agrablajn momentojn de tiu kongreso kaj por verki tiun artikolon, mi relegis kaj uzis la tre bone faritan kongreslibreton. Dankon al la organizintoj.

*Petro KIJO*

## Mesaĝo de Aborigeno

Kara blanka kamarado,
kelkajn aferoj ci devas scii:
kiam mi naskiĝas, mi nigras;
kiam mi kreskas, mi nigras;
kiam mi malsanas, mi nigras;
kiam mi estas sub la suno, mi nigras;
kiam mi malvarmas, mi nigras;
kiam mi timas, mi nigras;
kiam mi mortas, mi nigras.
Sed "ci", blanka kamarado,
kiam ci naskiĝas, ci rozas;
kiam ci kreskas, ci blankas;
kiam ci malsanas, ci verdas;
kiam ci estas sub la suno, ci ruĝas;
kiam ci malvarmas, ci bluas;
kiam ci timas, ci flavas;
kiam ci mortas, ci violas...
Kaj ci aŭdacas nomi min "kolorhaŭtulo"!

*Fonto: KD Verdasteloj Brazilaĵoj*
*Muziko kaj Teksto:* ***Tarcísio Lima.***
*MP3-Dosiero: 4511 KBajtoj*




http//esperanto-jeunes.org

Festo 2010, la partopreninda somero de JEFO, partnere kun-organizata kun la helpo de EUROKKA, okazos en **TOULOUSE** de la **13a** ĝis la **20a** de aŭgusto. Festo sendube estos la Esperanto-Muzika festivalo de la somero !

## Programo

Ĉiutage, je la 10a30 : okcitanaj kaj katalunoj kursoj

**Vendrede, 13/08**

- 21a30 : Interkona vespero. Ludoj kaj libere improvizita programo kun la surlokaj muzikistoj. Tifen, Emĉjo, Kvenĉjo, Ben, Platano, Gijom, JoMo, ktp...

***Sabate, 14/08***

- 16a : okcitana posttagmezo en Tuluzo.
- 19a : okcitana vespermanĝo en la Okcitana Domo 21a : okcitana vespero kun slama koncerto de Lou Dàvi en la korto de la Okcitana Domo.

Ekde dimanĉo, okazos kantateliero gvidata de KAJTO (je la 14a 30 ĉiutage krom ĵaŭde je la 10a 30).

***Dimanĉe, 15/08***

- Folka mondmuzika vespero :
- 21a30 : Martin Wiese (sola).
- 22a30 : JoMo kaj Liberecanoj.

***Lunde, 16/08***

Tuttaga ekskurso : bicikla laux la suda kanalo.
Teatra + kanzon-hiphopa vespero :

- 21a : T.T.T. (Tuluza Teatro-Trupo).
- 21a30 : Gijom.
- 22a30 : Platano + Hiphopa vespero.

***Marde, 17/08***

- Roka vespero :
- 21a30 : Dancers in red.
- 22a30 : Martin kaj la Talpoj.

***Merkrede, 18/08***

Tuttaga ekskurso : Albi/Cordes sur Ciel.
Tradicia bala vespero :

- 21a30 : JoMo (sola).
- 22a30 : Kaj Tiel Plu kun balo.

***Ĵaŭde, 19/08***

Kajto en Tuluzo-Plaĝo + Teatra kaj internacia vespero :

- 18a : KAJTO ĉe Tuluzo-Plaĝo.
- 21a30 : T.T.T. (Tuluza Teatro-Trupo).
- 22a : Internacia vespero.

## FOLIUMANTE nian REGIONAN BULTENON tra JAROJ -5-

| | | |
|---|---|---|
| **Bulteno** n° **68**a Julio 1963 | 8 paĝa | Redaktas Sro Jouis. - 19an de Majo en Caen : Sud Normanda Renkontiĝo : 16 personoj. - 9an de junio en Evreux : Nord Normanda Renkontiĝo : « Rue de l'Esperanto » à Evreux. - 23a de majo 1963 : **607** aliĝiloj al UNE depost 1947. Por 1962 : **167** personoj pagis kotizon. Listo de ĉiuj kiuj pagis. |
| n° **69**a Septembro 1963 | 6 paĝa | Cirkulero en la franca pri la Ruena regiono. |
| n° **70**a Januaro 1964 | 6 paĝa | Sekvo de la listo de ĉiuj membroj kiuj pagis kotizon : **167**. : Seine Maritime : **117**. Eure : **23**. Calvados : **21**. Orne : **2**. Manche : **2**. Diversaj : **2** |
| n° **73**a Junio 1964 | 5 paĝa | 32a kongreso en Lisieux : 25-26an de Aprilo. - Bulteno:180 ekzempleroj eldonitaj. |
| n° **74**a Aŭgusto 1964 | 4 paĝa | Artikolo : « Esperanto et scoutisme ». |
| n° **74** bis-a Novem. 1964 | 3 paĝa | Redaktas : Sro Beaumont. |
| n° **75**a Januaro 1965 | 3 paĝa | + aliĝilo al la 57a kongreso de UFE. - Redaktas : Sro Huet. |
| n° **77**a Decembro 1965 | 4 paĝa | En Le Havre : 57a Kongreso de UFE. |
| n° **78**a Majo 1966 | 4 paĝa | Renaskiĝo de la Yvetôt-a grupo. |
| n° **79**a Decembro 1966 | 4 paĝa | Por 1966 : 41 membroj en Les Andelys. Esperanta Stelo grupo en Sotteville naskiĝis en 1912. Morto de Sro Letendre, la 17an de Septembro. |
| n° **81**a Junio 1967 | 5 paĝa | 33a kongreso en Yvetôt : 29-30an de Aprilo 1967. Prezidanto : Sro Huet. Vicprez. Sro Pottier. Sekretariino : Sino Pottier. Kasisto : Sro Jouis. Membroj : Sroj Chamaret, Mammaux, Sino Vincent. Honorprezidanto : Sro Bosc. 65 personoj partoprenis la Kongreson. Informkunveno de UFE. |
| n° **1**a Oktobro 1967 ***NOVA SERIO*** | 3 paĝa | Redaktas Sino Vincent (Les Andelys) + Esperanto-Actualités n°3 junio 1967. Nacia enketo de Sino Vincent pri E°-instruado. |
| n° **2**a Januaro 1968 | 5 paĝa | Listo de apogantoj de E° sur po ŝtmarkoj : artikolo de Sro Chamaret. Ĝenerala kunveno de la Normanda Federacio de UFE la 11an de Februaro en Lisieux. |
| n° **3**a Aprilo 1968 | 4 paĝa | En Lisieux voĉdonado pri la statutoj de la Normanda Federacio de la Esp. Kulturcentroj. Prezidanto : Sro Jouis. Vicprez. : Sino Lavallée; Sekretario : Sro Pottier. Kasistino : Sino Vincent. Membroj : Rocques kiu poste resignis kaj estis ansta- taŭita de Fino Beaudouin, Lecoutre |
| n° **4**a Julio 1968 | 3 paĝa | Morto de Sro Saget, 86 jara. |
| n° **5**a Oktobro 1968 | 4 paĝa | Artikolo de Sro Chamaret pri Esnault Pelterie kaj Maryse Bastié (Poŝtmarkoj) |
| n° **7**a Marto 1969 | 5 paĝa | Artikolo de Sroj Huet kaj Bosc pri la Unuiĝo de Normandaj Esperantistoj. Kunveno de la federacianoj de UFE en Evreux la 23an de Marto 1969. |
| n° **8**a Junio 1969 | 5 paĝa | Rouen/Sotteville. Raporto de P. Lemarchand pri la 24a Sat-Amikara Kongreso en Parizo. |
| N° **9**a Septembro 1969 | 4 paĝa | Federacia kunveno en Evreux : Fino Beaudouin Sro Jouis reelektitaj. Fino Bonnet elektita. Renkontiĝo en Beuzevillette : 30 personoj, la 18an de majo 1969. |
| N° **11**a Marto 1970 | 3 paĝa | Esperanto-Actualités n°8 Decembro 1969. Redaktas Sro Jouis. Sro Pottier eldonas la bultenon. Artikolo de Sro Huet : « Daŭras la Unuiĝo de Normandaj Esperantistoj » 28an de Februaro en Yvetot okazis kunveno de la estraro de U.N.E. Kongreso de la Federacio de UFE en Les Andelys. |

*Daŭrigota...*

## Listo de kotizintoj por 2010

Rigardu ĉu via nomo estas en ĉi-suba listo : Jam pagis por 2010, ge-Sinjoroj :

BESSIERE, *BONNET,* CARON, *CHALM,* COLBERT, *COLOMBEL,* DEFRANCE, *DUBOIS,* DUFEU, *DUFLO,* DUFRESNE, *EVRARD,* GASCOIN, *GIBERT,* GUEROULT, *GUILMOT,* HELBERT, *HUBERT,* JEHENNE-LEDRAN, *JOURDAINE,* JOUVIN, *LARDEUR,* LEBRUN, *LECOUVREUR,* LEGUILLON-DECOSSE, *LELOUEY,* LEMARCHAND, *LEMELTIER,* LEONARD, *LEPREVOST,* LEROY, *LESUEUR,* LEVESQUE, *LOISEL,* MAGEREL, *MARIE,* MAURAU, *MICHAUD,* NARDIN, *NICOLAS,* PARIS, *PAUMIER,* POTTIER, *QUILLAUD,* RAUCH, *ROBIOLLE,* ROLLAND, *ROUSSEAU H.,* ROUSSEAU J., *SCHERTZER,* SCHLÜTER, *SENECAL,* SERY, *TAILPIED,* TANGUY, *THIERRY,* ZILLIOX.

Faru vian ĉekon profite de **ESPERANTO-NORMANDIE CCP 283 40 H ROUEN Abon-kotizo por 2010 : 8 Eŭroj**, kaj sendu ĝin al la kasisto : .

Pierre Lemarchand, 2 Résidence Les Terres Quemines. 76113 Hautot sur Seine.

### *Sekvo de la unua paĝo : « Les Deux bouts de la langue »*

A l'autre bout de la langue de fermeture, locale, étroite, xénophobe, il existe une langue d'ouverture, globale, vaste, cosmopolite, universelle : l'espéranto. Elle est la création de Ludwik Zamenhof, un juif de Bialystok, une ville alors située en Russie (en Pologne aujourd'hui). Dans cette cité où la communauté juive côtoyait celle des Polonais, des Allemands et des Biélorusses, les occasions de ne pas se comprendre étaient nombreuses. En ces temps, déjà, Dieu pouvait jouir de son forfait. Fin 1870-début 1880, l'espéranto se propose donc le retour au Babel d'avant la colère divine.

A l'heure où le mythe d'une langue adamique semble prendre la forme d'un anglais d'aéroport parlé par des millions d'individus, on comprend que la langue de Shakespeare mutilée, amputée, défigurée, massacrée, dévitalisée, puisse triompher de la sorte puisqu'on lui demande d'être la langue du commerce à tous les sens du terme. Vérité de La Palice, elle est langue dominante parce que langue de la civilisation dominante. Parler l'anglais, même mal, c'est parler la langue de l'Empire. Le biotope de l'anglais a pour nom le dollar.

Mais cette langue agit aussi comme un régionalisme planétaire : elle est également fermeture et convention pour un même monde étroit, celui des affaires, du business, des flux marchands d'hommes, de choses et de biens. Voilà pour quelle raison l'espéranto est une utopie concrète à égalité avec le projet de paix perpétuelle de l'abbé de Saint-Pierre, autant d'idées de la raison dont le biotope n'est pas "l'avoir" mais "l'être" - plus particulièrement "l'être ensemble" sans perspective d'échanges autres que de biens immatériels.

L'espéranto propose d'habiter une langue universelle, cosmopolite, globale qui se construit sur l'ouverture, l'accueil, l'élargissement ; elle veut la fin de la malédiction de la confusion des langues et l'avènement d'un idiome susceptible de combler le fossé de l'incompréhension entre les peuples ; elle propose une géographie conceptuelle concrète comme antithèse à la religion du territoire ; elle parie sur l'être comme généalogie de son ontologie et non sur l'avoir ; elle est le vœu d'une nouvelle Grèce de Périclès pour l'humanité entière - car était grec quiconque parlait grec : on habitait la langue plus qu'un territoire - ; elle est la volonté prométhéenne athée non pas d'égaler les dieux, mais de faire sans eux, de quoi prouver que les hommes font l'histoire - et non l'inverse.

*Philosophe, **Michel Onfray** a fondé en 2002 l'Université populaire de Caen. Il est l'auteur d'une quarantaine d'ouvrages, dont "Le Crépuscule d'une idole. L'affabulation freudienne" (Grasset, 600 p., 22 €).*

La coopérative d'édition de SAT va éditer ce mois ci une édition en Espéranto du Traité d'Athéologie de Michel Onfray.

A cette occasion elle a demandé à l'auteur un avant propos. Bonne surprise, **Michel Onfray** a également proposé ce texte comme **tribune dans Le Monde du 11-12 juillet.**

Lire en ligne :
http://www.lemonde.fr/idees/article/2010/07/10/les-deux-bouts-de-la-langue-par-michel-onfray_1386278_3232.html